

46

# esperanto gazeto

DE INTERNACIA INSTITUTO POR OFICIALIGO DE ESPERANTO




J  
A  
N  
U  
A  
R  
O  
1971





# EL LA HISTORIO DE AŬTOMOBILKONKUROJ



La homo kiu konstruis la unuan motorveturilon kun benzina movoforto, kiu estas vere ekonomia, naskiĝis la 17-an de marto 1835. Li estis germano, Gotlib Dajmler.

## La motoro de Dajmler

La unua benzinmaŝino de Dajmler, kiu povis movigi veturilon, havis patenton kun la dato de 3-a de aprilo 1885. La sekvantan jaron la maŝino de Dajmler estis enkonstruita en motorboaton, kaj en 1889

Dajmler ekspoziciis sian motoron en la mondekspozicio en Parizo. En la mondekspozicio en Parizo naskiĝis la franca motorindustrio, kaj komenciĝis la epoko de la granda teknologia revolucio.

## La unua virino kondukisto

Tio ekzistis jene. Dajmler montris al vizitantoj de la ekspozicio la motorboaton en kiu estis enkonstruita lia maŝino. Subite alpaŝis al li virino kun du viroj; estis la vidvino de la industriisto Sarazeno.

Sarazeno estis propranto de la »Franca kompanio por benzinmotoroj kaj teknikaj konstruaĵoj«, kaj

autau sia morto li konsilis al sia edzino ĉiamaniere renkontiĝi kun la reprezentanto de la maŝinoj de Dajmler en Parizo, ĉar li persone konis la inventiston kaj kredis je granda estonto de liaj motoroj.

Dajmler proponis al la vidvino ke ŝi mem konduku lian aŭton al Parizo. Tiamaniere ŝi estis la unua kondukistino.

## La unua „Pejo“

En 1890 inĝenieroj, kun konsento de Dajmler, transigis la uzorajton de la maŝino de Dajmler por fabrikado de motorveturiloj al la kompanio »Filoj de Fratoj Pejo« el Valentinjo en Francujo... Tiel naskiĝis la unua aŭtomobilo kun la nomo »pejo«.

La sekvantan jaron, la inĝenieroj komencis mem produktadi motor-

veturilojn, ĉar kuraĝigis ilin la sukceso de »Pejo« en la enkonstruo de la motoro de Dajmler en »senĉevalan kaleŝon«.

La unua nomo de la aŭtomobilo estis »senĉevala kaleŝo«. Tiel fakte komenciĝis la historio de la motorveturilo kun benzina movoforto.

## La unua provkonkuro

En tiu tempo en Parizo aperadis »Malgranda Gazeto«, kiu siatempe multe skribis pri la »mirakla« veturilo — biciklo. Kiam aperis la aŭtomobilo, la redaktoro de »Malgranda Gazeto« Petro Gofar tuj konsciigis pri la grandaj eblecoj, kaj decidis organizi provkonkuron, kiu reklamos la novan inventon — »senĉevalan kaleŝon«.

Konata kiel provkonkuro Parizo-Ruano, tiu evento okazis dimanĉon la 22-an de junio 1894. Ambaŭflanke de la vojo inter Parizo kaj Ruano kolektiĝis amasego da ho-


moj. Inter la spektantoj estis ankaŭ amerikano Gejms Gordon Benet, propranto de la gazeto »Heroldo de Novjorko«. Beket sendis specialan raportiston-jurnaliston surbicikle sekvi la aŭton ĝis Ruano.

La provo (ĉar tio ne estis konkuro) sukcesis, kaj »Malgranda Gazeto« donacis la unuan premion en la valoro de preskaŭ 500 nunaj usonaj dolaroj. La premion dividis Panar kaj Levasor, inĝenieroj el Ivri sur Seno, kaj la »Filoj de Fratoj Pejo« el Valentinjo. Ambaŭ gajnintoj uzis la motorojn de Dajmler.

## La unua mondkonkuro

lo, kaj donis al ili la forton daŭrigi la klopodojn.

Unu el la entuziasmaj subtenantoj de la »senĉevala kaleŝo« estis iu grafo de Dion, kiu tuj komprenis la valoron de la provkonkuro



Surbilde estas la germano Karlo Benc (1884—1929), kiu sur movebla strio la unua fabrikis aŭton por simpla kondukisto.

Parizo-Ruano. Dion kunigis komitaton el aŭtomobiladeptoj, kiu poste fariĝis »Franca aŭtomobila klubo«. La tasko de la komitato kaj ĝia ĉefa celo estis organizi aŭtomobilkonkurojn, por ke la »senĉevalaj kale-

ŝoj« estu submetitaj al pli serioza teknika provo, kaj tiamaniere pruvu al la kontraŭuloj de la aŭtomobilo ke ili malpravas.

La komitato decidis, ke la vojo de la konkuro estu de Parizo ĝis Bordo kaj reen, kio ampleksas 1171 kilometrojn. Riĉaj amerikanoj Benet kaj B. K. Vanderbilt kontribuis grandajn monsumojn por premii la venkinton, ĉar Usono multe interesiĝis pri la unua aŭtomobilkonkuro.


La dekanon de junio 1895 je la 12,05 horo la unua »kaleŝo« forveturis de la Armiplaco en Versaĵo ĉe Parizo, kaj aliaj aŭtoj (entute 21) ekveturadis de la starto en intervaloj de du minutoj.

Bordon atingis la unua Emil Levasor sur sia »panar« kun motoro de Dajmler, kaj li tuj returnis ĝin al Parizo.

Levasor kondukis dum 48 horoj kaj 48 minutoj, kaj alvenis la unua veturante meze 24 kilometrojn hore!


Post Levasor trapasis la celon tri »pejoj«. El 22 ekveturintaj aŭtomobiloj la grandan vojon traveturis nur naŭ.

Tradukis: Nada Krljević



En la unua monda aŭtomobilkonkuro en 1895 venkis Emil Levasor. Li traveturis la distancon de Parizo al Bordo kaj reen, entute 1171 km., dum 48 horoj kaj 48 minutoj, veturante meze 24 km. hore.





# PRIMOŝTEN SOMERUMEJO POR ĈIES POŝO

En la fama Esperanto-somerumejo ĉe la lazura Adria Maro pasigis ĝis nun sian libertempon en plena esperantista etoso pli ol 5000 esperantistoj kaj iliaj amikoj el ĉiuj landoj de Eŭropo kaj multaj ekster Eŭropo. Le esperantistoj vivas tie en speciale aranĝitaj dultaj tendoj en pinarbaro tuj apud la bordo. Ili ĝuas konsiderindan rabaton kaj nur ili rajtas uzi la aŭtokampadejon.


Por tiuj kiuj ŝatas ĝui pli da komforto, ekzistas kvar unuarangaj hoteloj: »ADRIATIC«, »RADUĈA«, »ZORA« kaj »SLAVA«, finkonstruitaj dum la lastaj jaroj sur la jam mondfama primoŝtena duoninsulo. En tiuj hoteloj ĉiuj ĉambroj havas varmigitan plankon, tualeton kaj banĉambron, balkonon kun rigardo al la maro aŭ arbaro. La gastoj disponas ankaŭ pri la ronda vintra ba-

seno kun malfermebla vitra tegmento, kun varma marakvo; saŭno, elektraj instalaĵoj por masaĝo, ultravioletaj radioj por sunumado, mini-golfo, tenisejo, kaj aliaj distraĵoj — tiel ke la sezono daŭras senĉese, somere kaj vintre.

Kompreneble, en la tendaro la sezono estas limigita, sed pro tio oni devas sin anonci sufiĉe frue.

Krom sinbanado, gaja internacia amika rondo, boatveturado, fiŝkaptado, sporto kaj aliaj distraĵoj, vi povas partopreni la preskaŭ ĉiutage organizatajn ekskursojn laŭlonge de la marbordo, al insuloj kaj al la mirinde belaj akvofaloj de rivero Krka.

Kiu foje ripozis en Primoŝten, nepre revenas!



## DONACIOJ POR LA FONDUSO »OFICEJO«

Ernesto Sonnenfeld, Urugvajo . . . . .	\$ 5,—
Zaga Milosavljević, Jugoslavio . . . . .	\$ 2,—
Antaŭe kvitancita . . . . .	\$ 927,21
Entute	\$ 934,21

## DONACIOJ AL LA ĜENERALA KASO

Ernesto Sonnenfeld, Urugvajo . . . . . \$ 10,—

## NOVAJ SUBTENANTOJ POR 1970

Ernesto Sonnenfeld, Urudvajo, por la periodo 1970-1972  
Zaga Milosavljević, Jugoslavio

## ORA LISTO DE I. O. E. por decembro 1970

1. S-ino Dorothy Henderson, Kanado	US \$ 1387,20
2. F-ino Betty Salt, Kanado	" " 962,40
3. H. Scheffler, F.R. Germanujo	" " 123,—
4. Hans Werner Grossmann, Svisujo	" " 116,24
5. M. Italujo	" " 81,20
6-7. Ernesto Sonnenfeld, Urugvajo kaj Felix Epstein, F.R. Germanujo po	" " 75,—
8. Arne Pedersen, Danujo	" " 70,70
9. Gian Carlo Fighiera, Belujo	" " 56,—
La 10-an lokon dividas Antonije kaj Tibor Sekelj Jugoslavio, po	" " 41,70
Plej proksimaj kandidatoj: M. Kolinska (34,97), V. Kruusalu (34,08), H. Bakker (filo) (30,63), Ing. J. Dettwiller (25,12), A. N., F.R. Germ. (23,51), Ludoviko Demesmaeker (23,—), Z. Milosavljević (17,80), K. Novak (16,70), D. Dimov (15,—), Ark. J. Drlik (14,03).	

## PERANTOJ

- Argentino:** Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, ROSARIO
- Aŭstralio:** Kenneth G. Linton, 11 Poplar St., SOUTH CALFIELD, Vic. 3162. Abono: \$ 2,-
- Aŭstrujo:** Aŭstria Esperanto Movado, Hofburg, Bathyanystiege, A-1014 WIEN.
- Belujo:** »HEROLDO DE ESPERANTO«, 13 rue de la Reine, Bruselo 1., Abono 100 b. fr.
- Brazilo:** Alfredo Énio Duarte, Caixa Postal 18 (Esperanto) ZC-00, RIO DE JANEIRO, E.G.B., kaj BRAZILA ESPERANTO-LIGO, Praca de República 54, RIO DE JANEIRO.
- Britujo:** Brita Esperanto Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W 11.
- Bulgarujo:** Petr Ivanov Mutafĉiev, ul. Persenk, bloko 20-A, SOFIA-7, tel. 62 18 24; kaj Jordan D. Kalinov, Bul. »G. Dimitrov«, bl. »Debeljanov« A-20, RUSE. — Tel. 25877. Abonprezo 5 levoj.
- Ĉeĥoslovakio:** Jos V. Otta, Nerudova 32, ŠUMPERK. Jarabono 44 Kĉs. kaj DOVOZ TISKU, Praha 2 Vinohrady, Vinohradská 46.
- Danujo:** Ing. Uwe Lohse, str. Bakkesvinget 5, 3400. TULSTRUP/Hilrd. Poŝtĝirkonto 14 41 16. Abono DK 14.—
- Finnujo:** Joel Vilki, SOMERO-9.
- Francujo:** Germaine Kirtz, 5 bd des Alliés, F-68 MULHOUSE; Pĉk STRASBOURG No 993.48. — Abono: F 12,50.
- Germana Feder. Resp.:** Manfred Führer, Postfach 162 D-3340 WOLFENBÜTTEL; poŝteekkonto: Karlsruhe 1154 71.
- Grekujo:** Kimon G. Eliopoulos, 130 El. Venizelos str. NOVA SMIRNA — ATHINAI. Tel. 931-214.
- Hindujo:** Hinda Instituto de Esperanto, P.B. 604, NEW DELHI-1.
- Hispanujo:** Juan-Luis Vallés, Apartado 7018, BARCELONA. Abono 140 pesetoj.
- Hungarujo:** Hungara Esperanto-Asocio, Kenyérmező u. 6, BUDAPEST VIII.
- Israelo:** Ben-Alter Jehiel, P.O.B. 379 PETAH TIKVA Ab. 6 liroj. Poŝtekk. Bank Hadoaz 4-45854-8.
- Irlando:** Pat O'Reilly, »Woodbine«, Bluebell, Dublin 12.
- Italujo:** Dott. Giovanni Marchiori, Via Cantore 15 (Gal-

- leria Astra), 37100 VERONA. Abono 1.200 Liroj, poŝtĝirkonto n-ro 28/22942.
- Japanujo:** Internacia Fako, OOMOTO, Kameoka, Kio-to-hu
- Jugoslavio:** IOE, 11000 BEOGRAD, Lole Ribara 14 ĉk 608-8-1353-10. Abono 20 din.
- Kanado:** W.D.B. Hackett 326 Soudan Ave, TORONTO 7. Ont.
- Kubo:** Raúl Juárez Sedeno, Apartado 570, CAMAGÜEY.
- Madagaskaro:** Eugène Ravéloson, Boite Postale 1678, TANANARIVO.
- Meksiko:** F-ino Margarita Nájera S., Lauro Aguirre 243-3, MEXICO 17 D.F.
- Nederlando:** Ing. D. Klage, Talingstr. 8., SCHOORL (NH). — Abono 7,50 hfl al Boerenleenbank Schoorl (NH), Kto 5082 R.
- Norvegujo:** Eldonejo Esperanto A/S (Esperantoforlaget A/S), Box 942, OSLO 1., Poŝtĝirkonto 100.31.
- Pollando:** S-ino Miloslawa Kolinska, Sopocka 2/2, SZCZECIN
- Portugalujo:** D-ro A. César Anjo, Av. 28 de mayo 12, VISEU.
- Rumanujo:** Maria Vitályos, C, postala 14, TIRGU SECUIESC, jud. Covasna.
- Sovetio:** Ivan Palkin, ul. Televidenija d. 7, kor. 3, kv. 44, MOSKVA M-449.
- Valev Kruusalu, Pärja 42, TALLINN-9.
- Romano Grinšpan, ul. Sajfulina 4, TASKENT 125, Uzbeka SSR.
- Panas Vasilĉenko, Poŝtkesto 375. KIEV 24. Abonprezo 4 rub.
- Svedujo:** Gerhard Nyqvist, Johan Skyttes väg. 5 JÖNKÖPING.
- Svisujo:** Manfred Führer, Postfach 162 D-3340 Wolfenbüttel, Germ. Feder. Resp. Pĉk. Zürich 80-67294. kaj Claude Gacond, Miéville 133, CH-2314 LA SAGNE. Abono 9 Sv. Fr.
- Usono:** Conrad Fisher, R.F.D. No. 1., MEADVILLE, Pa. 16335.
- Venezuelo:** Prof. J. E. Bachrich, Aptdo. 146, VALENCIA, Edo. Carabobo.
- El ĉiuj aliaj landoj perantoj serĉataj. Perantoj ricevas 20%-an rabaton por kovri la kostojn.
- ABONPREZO: 2 dolaroj aŭ egalvaloro

Ni petas atenti nian novan adreson:

**11000 BEOGRAD, Lole Ribara 14**

## Polica Kunveno en Osnabrück (FRG)

Fine de novembro okazis en Osnabrück, FRG, diskutkunveno de Internacia Polica Asocio (IPA). La regiona sekciestro invitis s-ron Herman Behrmann kiu malfermis la kunvenon per enkonduka prelego en

Esperanto (tradukita de Otto Rösemann, Osnabrück). Dum la diskuto oni konstatis, ke la interkomprenigo okaze de internaciaj policaj eventoj estas mizera, kaj ke oni klopodu, ke inter la policistoj de la partoprenantaj urboj troviĝu almenaŭ kelkaj esperantistoj.

Sed por atingi tion, oni nepre bezonas la adresojn de ĉiuj policistoj-esperantistoj. Anoj de tiu ĉi homgrupo sendu mallongan komunikon, sed ankaŭ policistoj, kiuj laŭ instigoj de esperantistoj deziras studi la lingvon, skribu al Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1, FRG.

• CIUTAGE EN VIA DOM' LA GUSTA KAFO CENTROPROM  
SANTOS • MINAS • MIKSAJO • MINAS.

KAFO



**CENTROPROM**